
Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
La 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 24 – 27 novembro

# Facila Vento

24-a de novembro 2022, numero 2
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## La solena Inaŭguro de la VK-3 kaj Retoso

La unuaj sonoj, kiujn ekaŭdis spektantoj de la Inaŭguro, estis melodio kaj kortuŝaj vortoj de *Haleluja*, kanto, kiu en diversaj tradukoj kaj plenumamnieroj dum la lastaj jaroj sonas super Esperantujo kiel ĝia dua himno. Invitanta al la Montreala UK dum lasta tago de la UK en Lahtio, donanta esperon dum pandemiaj jaroj kiam la Montreala UK estis prokrastigita por du jaroj, nun ĝi, kortuŝe plenumita de Manno Montanna, benas la VK-3, portas tien spriton de la Montreala UK, unua ĉeesta UK post pandemio.



La gvidanto de Inaŭguro estis Viprezidanto de UEA Fernando Maia. Inter multo alia, Fernando diris ke VK-3 estas realigata revo, kaj revoj, kiujn oni revas solaj, neiam estas realigataj, nur tiuj, kiujn ni revas kune. Fernando rakontis pri la koncepto de VK-3, pri la temo, sama kiel la temo de Montreala UK "Lingvo, vivo, tero: La Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj", pri estontaj programeroj kaj iom pri nia *Facila Vento* :)


Fernando

La Prezidanto de TEJO, Albert S. T. Garrido, emfazis, ke malgraŭ tio, ke UK kaj IJK denove povas reveni al kutima realeco, tempo ŝanĝiĝis kaj fizikaj renkotiĝoj ne anstataŭos la virtualajn, kiuj proponas pli da egaleco al siaj partoprenantoj. Ankaŭ li invitis ĉiujn partoprenantojn de la VK ĝui Retoson kaj konatiĝi kun junulara agado kadre de diversaj programeroj, konkursoj kaj koncertoj.


Albert S. T. Garrido

Poste parolis la Prezidanto de UEA Duncan Charters, malgraŭ tio, ke en lia urbo estis nur la sesa horo de mateno! Pro tio ja li komencis sian parolon de la VK-programo, kiu permesas al homoj tra la tuta mondo elekti programerojn ne nur laŭ sia plaĉo, sed ankaŭ dum oportuna tempo, "Ni ne estas kune tempe. Sed estas kune spirite" – diris li. Memorigante pri gravaj ŝanĝoj kaj en la mondo, kaj en UEA, Duncan alvokis ĉiujn helpi pri Strategia Planado, pri kiu li multe parolis, al kiu dediĉis kelkajn artikolojn en la revuo *Esperanto*. La plej aktuala aperis en la ĉi-decembra numero.


Duncan Charters

Programeroj pri la Strategia planado okazos la 25-an de novembro, je la 12.00-13.25 por Afriko, Ameriko kaj Eŭropo kaj la 26-an de novembro je la 00.30-01.55 por Azio kaj Oceanio.


ILEI estis prezentita de sia Vicprezidanto Alessandra Madella kaj de sia prezidanto Ahmad Mamduhi. Alessandra invitis ĉiujn sekvontjare viziti Torinon kaj Italion ĝenerale ne nur por la UK, sed ankaŭ por TEJO




kaj ILEI kongresoj. Ahmad parolis pri aparta graveco de virtualaj renkontiĝoj, kiuj donas al Esperantujo esence novajn rimedojn por komunikado. Kiel ekzemplon li nomis tre sukcesan ĉi-jaran virtualan kongreson de ILEI – VEKI.




De flanko de E@I parolis Petro Baláž, li dankis sian teamon, kiu ebligis kaj ebligas ne nur nian ĝojon kongresi virtuale, sed ankaŭ eblon senti nin tie komforte. Petro multe rakontis pri la sistemo kaj donis utilajn konsilojn pri ĝia diversnivela uzado.




Vicprezidanto de UEA Amri Wandel prezentis sciencan kaj fakan programon. Tiun programon ankaŭ atingos vento de la Montreala UK, ĉiujn prelegojn de la IKU kaj scienca kafejo eblos re-spekti dum VK-3.




ESF sendis al la VK-3 salutan filmeton.



Fine de la inaŭguro Fernando invitis ĉiujn viziti UK-on en Torino, kaj poste sonis himno, plenumita en unu el vere nekutimaj por ĝi kaj interesaj manieroj. Kantis kaj gitarludis juna Brune.




Vi povas esti aŭtoro de Facila Vento kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio revuo.esperanto@gmail.com

# Du grandaj virinoj jubileas ĉi-jare

Ĉi-jare Esperantujo riĉas pri jubileoj. Sed ja ĉiu jaro estas tia kun kulturo tiel plenplena da elstaraj homoj, kiel la Esperanta kulturo. Inter aliaj jubileoj nun ni honorigu du virinojn.

## Lidia Zamenhof



80 jarojn antaŭe pereis la plej juna filino de Ludoviko Zamenhof, kiu evidente estis lia spirita heredanto kaj aktive agadis por la disvastigo de Esperanto kaj la ideoj nedisigeble ligitaj al ĝi. Ŝi lernis Esperanton en infanaĝo, kaj 14-jaraĝa jam tradukis al ĝi tekstojn de la pola literaturo, iom poste ŝi ekverkis mem. Fininte en 1925 sian universitatan studadon, ŝi fordonis sin plene al la laboro por Esperanto kaj baldaŭ dum la 17-a UK en Ĝenevo ŝi konatiĝis kun la Bahaa Kredo. Aktiva kaj senlaca, ŝi multe vojaĝis, portante transmonden ideojn de Esperanto kaj Bahaismo, instruis, tradukis, verkis por diversaj Esperanto-revuoj. Tre konata estas ŝia traduko de *Quo Vadis?*, la verko de Henryk Sienkiewicz.

Pro ŝia jud-deveno, ŝia vivo finiĝis tre frue kaj tragike, ŝi estis murdita en la germana ekstermejo Treblinka ie en la dua duono de 1942.

24-an de novembro, 15.00-16.25 kadre de la VK-3 okazis programero, dediĉita al ŝi kaj preparita de Bernhard Westerhoff kaj Joachim Böhmeke "Lidia Zamenhof – 80 jarojn post ŝia tragika pereo ".

## Eli Urbanová

100 jarojn antaŭe, la 8-an de februaro de 1922 naskiĝis Eliška (Eli) Urbanová, fama poetino. Ankoraŭ tre juna ŝi ekverkis en la ĉeha lingvo, kaj lerninte Esperanton en la 1948, jam en 1950 ŝi posedis ĝin sufiĉe bone por eksperimenti kun ĝi per siaj novaj poemoj. Ŝiaj ĉeĥlingvaj verkoj post Dua Mondmilito aperadis en ĉehaj revuoj, en Esperanto aperis kelkaj ŝiaj poemaroj.




Temoj estas diversaj, sed ĉiam kolorigitaj per emocieco, sincero kaj personeco de la aŭtorino, apartan lokon okupas eterna temo de amo, prezentita same sincere, laŭ vortoj de Baldur Ragnarsson "senpudre". Tamen pleje famiĝis Eli ne per poemoj, sed per sia aŭtobiografia romano *Hetajro dancas*. Ŝi estis Honora Membro de UEA, membro de la Akademio de Esperanto (1986–1995), instruisto de Esperanto-kursoj. En 2003 okazis Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK "Intimaj temoj en Esperanto-beletro" inspirita de ŝia verkaro. 26-an de novembro, 15.00–15.50 kadre de VK-3 okazos programero, dediĉita al ŝi kaj preparita de Petro Chrdle "Eli Urbanová: 100 jaroj post la naskiĝo, 10 jaroj post la morto".

# Legantoj de la revuo Esperanto

Dankon al ĉiuj legantoj de la revuo *Esperanto*!


Venu al la renkontiĝo kun legantoj de la revuo *Esperanto* kadre de la VK3: demandu, proponu, babilu! La renkontiĝo okazos la 25-an de novembro, vendrede, je la 16.00 laŭ UTC.

Ne hezitu sendi viajn demandojn, proponojn ka. al la retadreso de la revuo: *redakcio@revuoesperanto.org*



















# Interesaj kaj amuzaj rezultoj de "Bonvenon al Retoso"

Dum bonveniga programero de Retoso, okazis interaga kvizo kun pluraj interesaj demandoj, ni prezentas al vi la unuan parton de respondoj, foje amuzaj kaj foĵe eĉ neatenditaj! La duan parton vidu en la morgaŭa numero de *Facila Vento*.

















**Eventa Servo**
estas retejo per kiu oni povas registri, listigi kaj diskonigi eventojn tutmonde.